

FENIX

ESPERANTO
*
NEDERLAND



15a jarkolekto n-ro 1 januaro - februaro 2010

REVUO DE ESPERANTO NEDERLANDO

FEN X

ESPERANTO
NEDERLAND

Forumo de Esperanto Nederland

www.esperanto-nederland.nl

Dumonata membrogazeto de *Esperanto Nederland*.
ISSN 1384-6515

Membroj de *Esperanto Nederland* ricevas la gazeton; ĝi estas aparte abonebla nur por ne-membroj en eksterlando. Tarifo EUR 15.-

Por tiuj, kiuj tion bezonas, son-kasedoj kun la enhavo estas haveblaj. Informojn donas la sekretario.

Redakcio: <redakcio@esperanto-nederland.nl>
H. Bakker, Kastelenstraat 231II, 1082 EG Amsterdam,
tel./fakso 020-64 21 853 <hansbakker@raketnet.nl>.

J.K. Hammer, Taxusstraat 7, 1505 AA Zaandam,
tel. 075-616 69 31, <ko.hammer@planet.nl>.

Esperanto Publike:

Gazetartikoloj ktp estas bonvenaj ĉe redaktoro Hans Bakker, same kiel informoj pri mencioj de Esperanto en radio kaj televido. Bonv. indiki detalojn.

Lingva rubriko:

Emiel Van Damme, Albert 1 straat 44,
BE 1703, Schepdaal, Belgio.

Teknika redaktoro:

Julia De Coster, Esperanto-Centro Antverpeno.

Presado: Flandra Esperanto-Ligo, Antverpeno.

ESPERANTO NEDERLAND

Prezidanto

Gerrit Berveling, Kalverstraat 8-B, 8011 LH Zwolle.
Tel.: 038-4237003
Retadreso: <gerrit.en.madzy@planet.nl>.

Sekretario

PROVIZORE vi uzu la adreson de Ineke Emmelkamp,
Arubastraat 12, 9715 RW Groningen. Tel.: 050-57 18 842.
Retadreso: <info@esperanto-info.nl>.

Membro-Administranto:

Remment Balk, Egeïschestraat 42,
8303 EN Emmeloord. Tel. 0527-23 93 78 //
<membroj@esperanto-nederland.nl>.

Kasisto: Els ten Hagen-Renses, Middenweg 587,
1704 BH Heerhugowaard. Tel. 072-571 79 18,
<kasisto@esperanto-nederland.nl>.

Bankkonto: 78 68 44 167 nome de ESPERANTO
NEDERLAND; **UEA-konto:** esne-h

Informado/informmaterialo: Ineke Emmelkamp,
Arubastraat 12, 9715 RW Groningen. Tel. kaj fakso:
050-57 18 842. Retadreso: <info@esperanto-info.nl>.

Instrua Servo: Luit Staghouver, Julianalaan 25, 9781 ED
Bedum. Tel.050-301 40 15, <luitstaghouver@home.nl>.

Studie-weekeinde:

<studsemajnfino@esperanto-nederland.nl> aŭ Marijke
Lathouwers, Kruiszwijn 1205, 1788 LE Den Helder,
Tel: 0223-643781.

ENHAVO

- 2 De la redakcio / Kotizo / Semajno de Int. Amikeco.
- 3 Ĝenerala kunveno 2010 / Alvoko de la prezidanto / Serĉludo / Beneluksa kongreso / Esperanto Publike
- 4 A.J.Middelkoop, 1913-2009.
- 5 Sukceso de Fam. Bossong / Malferma tago UEA / Studosemajnfino.
- 6 A-Komitatanoj.
- X Lingva Rubriko.
- 7 Ekskurso ĉe la redakcio.
- 8 Ivo Lapenna / Faulhaber-Konferenco.
- 9 Vortordo libera... ĉu vere?
- 10 Filatelo, poŝtmarkoj pri Lapenna kaj Zamenhof / Skolta E-L. / Herzberg, la E-urbo.
- 11 NGGE kunvenis / Komunikado de IEI / E-vid-E-nt-E

PRI PAĜO 1

S-ino A.J.Middelkoop, trifoje honora membro. Rob Moerbeek verkis vastan memorigan artikolon pri tiu modesta gravulo de nia asocio.

DE LA REDAKCIO

Unue, karaj legantoj, la redakcio deziras al vi feliĉon kaj sanon en la nova jaro.

Ni esperas ke ĉi tiu numero denove donos al vi plezuron. Plenplena ĝi estas de raportoj pri estintaj eventoj, kaj invitoj al multaj kunvenoj kaj kongreso.

ESPERANTO NEDERLAND invitas vin partopreni en la Beneluksa Kongreso en Antverpeno, kaj aldonas specialan aliĝilon al ĉi tiu numero.

Interesan artikolon pri la vortordo, de Wim Jansen, vi trovos en paĝo 9.

En paĝo 11 vi trovos artikolon pri la tre valora laboro de E-vid-E-nt-E. Ni ĝojas, ke fine ni trovis lokon por tiu fondaĵo.

Kelkajn recenzojn ni devis konservi ĝis venonta numero.

JKH



HELPU VIAN ASOCION...

Kaj nun pagu vian kotizon por 2010 al konto 78 68 44 167 de Esp.Nederland, Heerhugowaard.

Plena kotizo EUR 27,50, samhejmano EUR 8.-

Por membroj de NEJ: EUR 13,75, samhejmano EUR 4.-.

Abono al Fen-X por eksterlandano EUR 15,-.

SEMAJNO DE INTERNACIA AMIKECO

La festo por la Semajno de Internacia Amikeco en Leuven okazos sabaton la 6-an de februaro 2010. Jes, iom pli frue ol la S.I.A. mem. Ne nur tio estos novaĵo! Ne necesas antaŭverti pri alveno, ĉiu estos bonvena.

Senpaga revunumero kun persona invitilo estos sendita en januaro al ĉiu kiu petas ĝin ĉe

<info@esperanto3000>

DATOLIMO:

Materialo por la venonta numero estas bonvena ĝis la fino de januaro. Sendu ĝin kiel eble plej frue, tiam vi ege helpas nin.

MEMBROKUNVENO 2010

La jarkunveno de ESPERANTO NEDERLAND okazos sabaton la 29-an de majo en la kunvenejo Vredenburg en Utrecht. La tagordo konsistas el la ĝeneralaj punktoj: sekretaria kaj financa jarraportoj 2009, elektoj por la estraro kaj la diversaj komisionoj, propono de la estraro kaj/aŭ de la membroj kaj aliaj laŭstatutajoj.

POR LA VENONTA SOMERO EN ESPERANTUJO.

En 2010 la UK de Esperanto, certasence la jarĉefkunveno de Esperantujo, okazos en Havano (Kubo). Persone mi ege ŝatus partopreni ĝin, se eblos.

Sed por multaj Eŭropaj esperantistoj Kubo estas tro malproksima; do, kion fari anstataŭe? Estas ja bona kurtimo dumferie iel restadi ankaŭ en Esperantujo. Ekzistas amaso da ebloj.

Kelkajn mi speciale ŝatus reliefigi:

Unue, Itala Esperanto-Federacio - Federazione Esperantista Italiana - organizos la 77-an Italan Kongreson de Esperanto en Linjano Orsabella - Lignano Sabbiadoro, de la 21-a ĝis la 28-a de aŭgusto 2010. Informoj troviĝas ĉe <http://italakongreso.esperantoitalia.it/>. Ĝi devas fariĝi kunveno kie vi certe trafos homojn el pluraj landoj.

Multe pli aventura estas la esperantista karavano per transsiberia trajno el Moskvo al Ulambatoro, al la 6-a Azia Esperanto-kongreso (Mongolio, junio 2010), por kiu oni jam povas aliĝi: nuntempe pretas kunvojaĝi proksimume 10 geesperantistoj el Francio, Italio, Germanio, kiuj aŭ jam trajnveturis al la UK en Jokohamo (Japanio, 2007), aŭ informiĝis pri la efektivigita vojaĝo E-karavane. Gvidos la tuton la jam sperta s-ino Tatjana Loskutova. Informoj inkluzive eĉ de fotoj pri antaŭa vojaĝo (i. a. pri mi kaj mia edzino) ĉe http://mongolio.info/?page_id=539 >.

Kompreneble oni ne forgesu pri la pli tradiciaj Esperanto-adresoj kiel Grésillon ks., sed tiujn vi ja konas. Bonan somerumadon!

Kaj nepre ne forgesu bonan stokon da novaj Esperanto-libroj! Estas sufiĉe da!!!

Gerrit Berveling

BENELUKSA KONGRESO DE 2010

Flandra Esperanto-Ligo invitas vin al la Beneluksa Kongreso, 13-16 majo 2010, Antverpeno, Belgio.

TEMO: Lingva prismo en Benelukso.

El la programo:

- la lingva prismo en Benelukso: prelegoj i.a. de István Ertl, Alain Dawson, ...
- prelego pri 50 jaroj de Benelukso
- popola balo kun Esperanta grupo Kapriol'!
- ekskursoj al malpli amaturismaj lokoj
- jubileo de Movado sen Nomo

Restado: Ni trovis 2 gastejojn sufiĉe proksimajn al la Esperantocentro! Unu malluksan por 13 EUR nokte, alian pli luksan por 35 EUR nokte.

Por pliaj informoj: F.E.L., Tel. 00-32-3.234.34.00.

Frankrijklei 140, BE 2000 Antwerpen. <sekretario@fel.esperanto.be>.

Vidu la aliĝilon en ĉi tiu numero!

SERĈLUDO...

Ĉu vi vidas surstrate butikon kun Esperanto-nomo? Aŭ ĉu vi konas produktojn kiuj havas Esperanto-nomon? Ĉu vi konas la laktfabrikon DOMO? La ŝuvendejon INVITO ?



En Nanjing (Ĉinio) mi vidis vendejon kun la nomo BALENO! Pluraj membroj jam sendis materialon por tiu konkurso. Sed ni volonte ricevos pli da interesaj ideoj. Faru foton kaj sendu ĝin al: ESPERANTO NEDERLAND, Arubastraat 12, 9715 RW Groningen, ĝis la unua de aprilo 2010.

Dum la membrokunveno, la 29-an de majo 2010, ni montros ĉiujn envenintaĵojn.

Ni atendas ke la ludo, ne nur serĉa, sed ankaŭ ŝerca, havos grandan rikolton. Kaj, jes, tiun premion de EUR 100,-- oni povas ricevi nur dum la ĝenerala kunveno 2010.

ESPERANTO PUBLIKE

La princino de la monato estas Ineke Emmelkamp, kies ridanta vizaĝo ornamas paĝon 2 de Groninger Weekblad de la 24-a de novembro 2009. "Taal van niemand" estas la titolo. La intervjuon kaŭzis la iniciato de ESPERANTO NEDERLAND kontakti ĉiujn loĝantojn de Zamenhofstratoj en Nederlando. Precipe Joke Hoobroeckx faris tiun laboregon en la jubilea jaro 2009 kun foje surprizaj sukcesoj.

Alia gazeto en Groningen, Gezinsbode, la 30-an de septembro anoncis "Open avond liefhebbers Esperanto". La sekcio nordnederlanda de ESPERANTO NEDERLAND per tiu artikoleto atingis amasan publikon por sia vespero de la 1-a de oktobro 2009.

Ans Heijstra profitis la studsemajnfinojn en Vlaardingen kaj dissendis 40 artikoletojn pri ĝi al gazetoj kiuj estas senpage distribuataj en Norda Holando, kaj al dimanĉaj gazetoj.

Tri sukcesoj estas konataj:

21/10 en "Zaankanter, kun grasa titolo: Studieweek Esperanto; 25/10 en "Zondagochtendblad" kun grasa titolo: Esperanto / "De Krommenieër" (mankas detaloj)

Vidu, kiel eĉ malproksima kaj malgrava evento povas plenigi truon sur la paĝo de gazeto. "Je hoort nooit iets over Esperanto" ne estos aŭdata en Norda Holando. Pro la konstanta laboro de nur unu esperantisto.

HB

TRIOBLE HONORA MEMBRO A.J. MIDDELKOOP KARMEMORA (1913 – 2009)

Post la Esperanto-bapto ĉe miaj gepatroj, en la Centra Oficejo la direktoro Victor Sadler helpis per atenta korektado de miaj multaj misfrazoj, sed ankaŭ poste cedante duonferion por sekvi la lekcionojn de S-ino Middelkoop, Attie por la familianoj. Eĉ kvin el ŝiaj naŭ instruaroj mi ĝuis. Altnivele de 1969 ĝis 1978 en jam baldaŭ tri niveloj ŝi nin klerigis, aktivigis en plenaj horoj: “La partoprenantoj ja devas longe vojaĝi, pagi la trajnbiletajn, do ili meritas la plenan tempon”, ŝi sciigis transdonante la torcon. Kaj ŝi havigis la trakopiojn de siaj kursfinaj raportoj, postulitaj de la Universitato de Amsterdamo. Mankas nur la komenca, sed tiun pli ol kompensas la brila inaŭgura lekcio “Humuraj trajtoj en la Esperanta Literaturo”, laŭ la esperantigo, kiun Jo Punt faris okaze de la kvaronjarcenta jubileo (1984). Ĝi estas surprize amuza sed sciencnivela. Simile al la anglalingva lekciaro de Marjorie Boulton en la Oksforda Universitato, ŝi en Esperanto traktis la diversajn literaturajn ĝenrojn: romano, novelo, poezio. Ĉi-lastan per originalaj verkoj pri Zamenhof kaj Esperanto. Kaj por tekstklarigoj ŝi elektis tekstojn de tiu alia jubileulo de 2009: el “Elektitaj Paroladoj kaj Prelegoj” de Ivo Lapenna. Jam dume ŝi instruis ankaŭ (nelonge) en pedagogia akademio en Amsterdamo. Kaj post la agado en la ĉefurbo, kvazaŭ liberigita de amzorga sed peza tasko, tuj plenenergie ŝi ekinstruis Esperanton en popoluniversitato de Hilversum kaj Amersfoort.

Fakte ŝia instrua kariero startis en ŝia studofako, klasikaj lingvoj. Tamen post nelonga aktivado en liceo, ŝi dediĉis sin al lernantoj bezonantaj kromlecionojn. Ŝia ĉefa vivocelo estis disvastigi Esperanton kaj ankaŭ en Nederlanda Esperanto-Asocio ŝi aktivis por la kultura agado. En Jarraportoj legiĝas la refreno, ke tre grava laboro estas verki fidindajn protokolojn, kion plenumadis D-dino Middelkoop. (Tiu - nur por nederlandlingvanoj komprenebla - latinaĵo “doctoranda”, t.e. doktorigota, estis uzata anstataŭ licenciulo, magistro.) Do eble kontribuis ŝia laboro en oficejo, ĉar ĉion ŝi faris kun solida devokonscio. De la 20-a de aprilo 1985 datiĝas bela dokumento subskribita de prezidanto Jan Verheule kaj sekretario Willem Verloren van Themaat, agnoskanta ŝiajn grandajn meritojn por la nederlanda Esperanto-movado per Honora Membreco. Kiel estrarano pri kulkuro ŝi havigis al nederlandaj publikaj bibliotekoj la lernolibron de Zondervan kaj Manders kaj dank’ al ŝia pledo Rob de Nijs eldonis kantojn en Esperanto.

Ŝi ankaŭ post la retiriĝo restis plene interesita pri la movado, apogis min per konsiloj. Kaj kiam reduktiĝis ŝiaj korpaj fortoj, plej kruele la vidpovo, ŝi volonte akceptis vizitojn. Foje min veturigis al la hospitalo, kie ŝi estis operaciata post falo, spertinto de kursosemjanfino de ESPERANTO NEDERLAND. Ŝi estis ekzamenota por la elementa diplomo kaj malofte havis okazon paroli, do ne estis aparte memfida. Nu, ankaŭ en la ekza-

mena komitato S-ino Middelkoop havis siajn spertojn, do ŝi starigis kelkajn demandojn tiel, ke post nelonge la kandidatino jam parolis pli kuraĝe. Tamen jam antaŭe ŝi petis min paroli nederlandlingve pro laciĝo. Ĉi-okaze montriĝis ke la kapablo neniom regresis.

Lastan fojon mi vizitis ŝin sabaton la 14-an de novembro, avertite de mia muzikamiko Dik Middelkoop, ŝia pranevo, ke ŝi ne plu manĝas. Mi dankis ŝin pro la granda laboro kiun ŝi faris, per la bonega universitata laboro, la “Prisma”-vortaro ktp. Ne venis signo ke ŝi aŭdas (tamen, kiu scius?), do al la ĉeestantaj nevinoj mi rakontis ke en la Centra Oficejo oni ĵus montris bonkvalitan filmon pri la Esperanto-kurso kunorganizita de Hans Bakker por diverslandaj studentoj en labor-tendaro en “De Lakens”, parto de “Kennemer Duinen” ĉe Haarlem. Klare aŭdiĝas la voĉo de Attie Middelkoop, kiu devis klarigi kial tiel malmultaj nederlandanoj studas Esperanton: evidente pro la emo atendi ĝis aliaj ellernos la lingvon: “Tiam ankaŭ mi certe aliĝos!”

Unu horon post mia vizito ŝi mortis...

En la funebra ceremonio, la 19-an de novembro, ĉeestis pli ol tridek personoj. La pastoro rakontis ke ŝi sin dediĉis ankaŭ al la libercreda protestanta komunumo, diskutis kun li pri novtestamentaj tekstoj, kiujn ŝi legis en la originalo (komungreka), ŝiaopinie ĝenerale malĝuste interpretataj. Kaj li pravigis ŝin. Nova faceto por mi estis, ke ŝi ŝatis pianludi. Muzikaĵoj de Chopin do konvene kadris la solenaĵon. La nevinoj aldonis pri ŝia persona viva interesiĝo pri la familio, kaj ke ili trovis amasojn da libroj ŝiaj: nederlandaj, sed ankaŭ fremdlingvaj, eĉ hebrea, rusaj. Kaj la Hodler-Biblioteko de UEA bonvenigis la amasajn bonstatajn Esperantajn, pluraj el kiuj anstataŭas perditajn aŭ difektitajn ekzemplerojn.

La nevinoj rakontis ankaŭ ke kiam ili voĉlegis el ŝiaj vojaĝalbumoj, ŝi povis plurakonti pri la belaj kulturplenaj vizitoj kun Ans van Tinteren al ne nuraj kongresuroj. Sed ankaŭ Esperantajn tekstojn ili voĉlegis. Tiam plurfoje la maljuna aŭskultanto reinstruistiĝis kaj igis korekti fuŝan prononcon.

Ĉeestis interalie Ineke Emmelkamp por ESPERANTO NEDERLAND, Hans Bakker, Gerard Peet, kiu vikle varbis interesaton pri Esperanto, kaj Osmo Buller el la Centra Oficejo. Ĉar ŝi ja estis Honora Membro ne nur de ESPERANTO NEDERLAND kaj NGGE, sed ankaŭ de UEA ekde 1988.

Mi bone memoras kiom ŝi entuziasmiĝis aŭdante pri la sukcesoj kaj profesoriĝo de Wim Jansen. Kutime ŝia voĉo estis pianisima, sed tiuokaze ŝi aŭdebla voĉis sian ĝojon.

Nun finiĝis la proksimaj kontaktoj. Postrestas memoroj pri imitinda, elstare klera, kapabla reprezentanto de alta internacia kulturo.

Rob Moerbeek.

SUKCESO DE FAMILIO BOSSONG.



Dum la malferma tago de UEA S-ino Bossong fiere montris eldonon de la "asocio de luantoj" de la apartamentaro kie ili loĝas. Bela kolora broŝuro, en kies mezaj paĝoj aperis bildoj de ili ambaŭ, kaj intervjuo pri la agado por Esperanto, kaj precipe por la infana edukado "Bona Espero". La randon de la paĝoj ornamis multaj bildoj pri la laboro en tiu "vilaĝo".

MALFERMA TAGO DE UEA.

La 28-an de novembro okazis malferma tago en la Centra Oficejo de UEA. Ĉefa temo de la kunveno estis honora memorigado de Ivo Lapenna, kiu ja dum multaj jaroj estis unu el la plej imponaj prezidantoj de UEA. Carlo Minnaja kaj Duncan Charters parolis pri siaj kontaktoj kun Lapenna.

Cetere la estraro de ILEI sin prezentis kaj Yolanda Rodriguez kaj Norberto Diaz el Kubo salutis.

Tre vigla estis la prezentado de la nova muzikgrupo "Kapriol", kiu ne nur kantis sed eĉ dancigis multajn homojn. Cetere, kiel kutime, okazis vendado de esperantaĵoj, kaj prezentado de multaj filmoj pri antaŭaj kongresoj kaj kunvenoj.

Laŭ mi, inter la vizitantoj estis mirige multaj relative junaj esperantistoj...

LA MALFERMA TAGO 2010 okazos sabaton, la 17-an de aprilo 2010, de la 10-a ĝis la 17-a horo.

IMPRESOJ DE LA STUDSEMAJNFINO.

De la 6-a ĝis la 8-a de novembro 2009 okazis studsemajnfino en la NIVON-domo De Hoogkamer en Vlaardingen (iam mia naskiĝurbo).

Jam vendrede vespere alvenis multaj partoprenantoj. La studsemajnfino por mi persone ne nur estas por plue lerni Esperanton, sed ankaŭ por denove renkonti geamikojn kaj gekonatojn de aliloke el la lando.

Por komencantoj estas bona okazo por ekkoni la parolatan lingvon, klopodi kompreni la paroladon kaj transiri la sojlon por mem kuraĝi paroli.

Ĉu mi mem post tiom da jaroj ankoraŭ bezonas pluan lernadon de la lingvo? Jes, certe, mi devas konfesi ke malgraŭ preskaŭ ĉiutaga uzado de Esperanto mi ankoraŭ faras multajn erarojn. Mi forgesis diversajn aferojn, estas aferoj, pri kiuj mi dubas, ofte mi renkontas neatenditajn gramatikajn problemojn. Estas bone, ke, flanke de niaj klubvesperoj, ekzistas tiaj semajnfinoj, kie ni povas konsulti niajn lertajn, servopretajn kaj precipe paciencajn instruistojn. Honoron al ili!

Nia grupo estis denove internacia, pro la ĉeesto de belga samideanino kun sia filineto kaj nia bulgara amiko Nedko Nedev. Ankaŭ bone estis ke ni povis bonvenigi tiom da junuloj. Entute ĉeestis 30 partoprenantoj.

Ni entuziasme en diversaj grupetoj studis, interrompita de la kaf- kaj te-paŭzoj kaj la necesaj manĝoj, bonege preparitaj de niaj organizantoj Marijke, Vinus kaj Juri. Sed ne nur de ili, ĉar ankaŭ aliaj samideanoj kontribuis al la manĝopreparado.

Kompreneble ni devis atenti la liston de deĵoro post la manĝoj kaj la paŭzoj, la liston de la "devigataj volontuloj". Sed ĉiuj bonhumore kaj bonvole plenumis siajn taskojn, kaj la aliaj, fakte ĉiuj iom kontribuis al la laboro, bone por la solidareco.

Sabatvespere oni volis al ni montri filmon, sed pro teknikaj mankoj tio estis malsukcesanta. Do oni multope, komplike improvizadis per diversaj ŝnuroj, mi eĉ timis ke iu malĝusta ŝnuro eniros la surmuran kontaktilon, kaŭzante iun eksplodon. Sed finfine oni sukcesis funkciigi la projekciadon de la filmo. Bedaŭrinde la sono ne funkciis, sed la filmo estis subtitolita en Esperanto. Sed estis filmo de malmultaj vortoj, la tradukinto ne havis tiom da laboro. En alia rondo oni vigle parolis (oj, oj, tiom da krokodilado...), sed ni aŭdis ankaŭ muzikon, de tempo al tempo mi aŭdis pianon, poste la gitaron de Marijke kaj el iu kvadrata valizo de Martien venis iu aparato, kiu pro modesteco ne volis nomi sin akordiono, sed simple "tirsako" sed la muziko el tiu sako estis bonega.

Kiel vendrede vespere denove ni malfrue enlitiĝis.

Dimanĉe ni daŭrigis la seriozajn aferojn, studi tiun strangan, sed scivolemigan, preskaŭ ekzotikan, vere lernindan lingvon.



Posttagmeze la vetero fariĝis tiel bona, kun tiel klara blua ĉielo kaj tiel varma suno, ke oni decidis preni "freŝan nazon", promenante en la ĉirkaŭaĵo.

Fine proksimume je la kvara ĉio estis preta. Ni adiaŭis, post fruktodona, sukcesinta semajnfino.

Denove, dankon al niaj instruistoj, kontribuistoj, deĵorintoj, organizintoj, ĉeestintoj, esperante, salutante, dirante: "Ĝis revido en Schoonloo en marto!"

Peter den Breems.

LA VENONTA STUDSEMAJNFINO...

okazos de 12 ĝis 14 marto 2010 en la grupdomo De Strubben, Hoofdstraat 4, 9443 TJ en Schoonloo. (Drenthe). Informpetoj kaj aliĝoj ĉe: Juri Smolders, Warmoesstraat 7, 1521 CH Wormerveer, tel. 075-6123471, aŭ rete:

<studsemajnfino@esperanto-nederland.nl>.

Nur informpetoj: Marijke Lathouwers, Kruiszwijn 1205, 1788 LE Den Helder. Tel: 0223-643781, aŭ rete: <lj.lathouwers@quicknet.nl>.

LA Funkcio de la A-Komitatanoj

Reprezentanto de ESPERANTO NEDERLAND en Universala Esperanto-Asocio (Komitatano A).

En la jaro 2010, elektojaro por la Komitato de UEA, finiĝos mia deĵorperiodo kiel Komitatano A. Al la estro de nia landa asocio mi sciigis, ke mi ne volas denove kandidatiĝi.

La estraro de ESPERANTO NEDERLAND donis al mi la okazon iom informi pri la taskoj, "devoj kaj rajtoj", de landa reprezentanto en la Komitato. Tio okazis en la pasinta Ĝenerala Membrokunveno de nia Asocio. Ŝajnas al mi ke mi ripetu tiujn informojn en Fen-X. Ĝi ja estas pli legata ol la kunveno estas vizitata....

Komitatano A reprezentas sian Landan Asocion (LA) en la Komitato de UEA.

La (estraro de) Landa Asocio nomumas sian reprezentanton. La LA informas pri tiu nomumo la estraron de UEA per la Centra Oficejo (CO, la Ĝenerala Direktoro) de UEA. Tio okazu plej laste en la monato majo de elektojaro, antaŭ la Universala Kongreso.

Komitatano A, do, estas reprezentanto. Samtempe ŝi/li apartenas al la gvida organo de la Universala Asocio.

Tio postulas du kvalitojn:

1. oni konu sian landan asocion, la agadon, la informadon, la gvidprogramon kaj la laborplanon.

Ĉiu membro, kiu legas Fen-X, kiu partoprenas Esperanto-kunvenojn en la regiono, kiu legas kaj komprenas la laborplanon/buĝeton, kiu scias pri la diversaj ebloj lerni la lingvon internacian, kiu sekvas aktualaĵojn kaj kiu scipovas esprimi sin en Esperanto, rilati kun homoj de diversaj kulturoj/opinioj, ĉiu tiu membro povas reprezenti sian Landan Asocion ESPERANTO NEDERLAND. Rilate al aktualaĵoj oni pensu pri la doktoriĝo de Ziko van Dijk, la doktoriĝo de Wim Jansen kaj ties universitata inaŭgura parolado post la nomumo kiel profesoro. Okazas regule diskutoj publikaj pri lingvaj problemoj en la internacia komunikado, pri minacataj lingvoj, pri privilegiataj lingvoj ktp. Esperantistoj kaj ne-esperantistoj skribas pri tio. (Ne ĉiam pri Esperanto, pli ofte rilatante la problemon pri kiu Esperanto estus ponto/solvo.)

2. Komitatano estu persono kiu jam de kelkaj jaroj partoprenis Univeralajn Kongresojn.

Ne turisme, sed labore! Ŝi/li konu la internacian movadon, precipe - sed ne nur - UEA.

Prefere oni agas en UEA.

La reprezentanto en UEA informu siajn kolegojn pri la agado en sia lando. Ĝenerale tio okazas dum subkomitatataj kunsidoj. Interŝanĝo de ideoj povas plialtigi ĉies agadon.

La reprezentanto ankaŭ informu sian LA pri tio kio okazas en UEA, kio estas aktuala, ekzemple pri la Strategia Laborplano de UEA. La nuna Strategia Laborplano havas tri ĉeftemojn: Informado, Instruado kaj Utiligado de la lingvo Esperanto.

Konkrete la Komitatanoj aliĝas al reta listo en kiu estas diskutataj temoj kiuj koncernas UEA kaj la laboron de la Komitato. Tiaj diskutlistoj (ekzistas pluraj subkomitatataj

listoj pri diversaj temoj) funkcias nur se ili estas bone gvidataj de unu persono. Tiu - ĝenerale la koncerna estraro - starigu klarajn temo-punktojn/-demandojn, informas ĝis kiam oni povas diskuti, formulas la rezultojn. Se necese la Komitato en sia fizika kunveno faras findecidon aŭ konkludon.

Fizika kunsido de la Komitato.

Unufoje jare la Komitato kunvenas. Tiu kunveno okazas dum la Universala Kongreso kaj ĝi konsistas el diversaj kunsidoj.

De kelkaj jaroj estas kutimo ke la Komitato kunsidas en la sabato antaŭ la inaŭguro de la UK. (Ĝenerale de la 14-a horo ĝis la 18-a horo.)

Dum la kongresa semajno oni pridiskutas Komitatajn temojn en 8 subkomitatoj. (Bonvena estas publiko, ĝi havas parolrajton. Pri proponoj/konsiloj ktp. al la Komitato povas voĉdoni nur la ĉeestantaj komitatanoj.) Ĝenerale unuopa Komitatano ĉeestas 3 ĝis 4 tiajn kunsidojn.

En vendredo - la lasta kongresa labortago - la Komitato kunsidas plene (de la 9-a horo ĝis la 13-a/14-a.)

Vi bone komprenas: dum la Universala Kongreso bone funkcia Komitatano havas multe da laboro kaj malmulte da "libera" tempo ĝui kongresajn erojn. (Tial ŝi/li estu iom sperta: sciu kiel elekti, kombini programerojn - kompreni kongresan programon, scii kie trovi ŝanĝojn ktp.)

La Asocio ESPERANTO NEDERLAND komprenas ke ne ĉiuj tagoj estas feriaj tagoj. Ĝi do iel kompensas la laboron. Pli ĝuste: ĝi kompensas iom el la elspezoj, laŭ ĉiujara decido en la Ĝenerala Membro-kunveno.

Ĉu mi malkuraĝigas vin, menciante ĉiujn taskojn kiujn frontas Komitatano A?

Ne ĝeniĝu. Se vi ne kapablas aŭ emas plenumi tiajn taskojn restas amaso da aliaj kiuj gvidos vin - finfine - al plena kapableco! (Ĉu tio ne similas iun gradon de ekzameno??? . . .)

Sed: se mi tiklis vian scivolemon, sciu ke ĉiam mi estas preta reagi al viaj demandoj, sugestoj, proponoj. (Ans Bakker-ten Hagen <ten_hagen@raketnet.nl >)

Kaj: kiam ĉio estas klara kaj por vi alloga, vi anoncu vian kandidatiĝon por Komitatano A (por la periodo 2010 - 2013).

Sinproponoj estu senditaj al la - provizora - leterkesto de "ESPERANTO NEDERLAND":

Arubastraat 12, 9715 RW Groningen. Rete: <info@esperanto-info.nl >.

Malgraŭ la fakto ke dum 9 jaroj mi funkciis kiel Komitatano (el tiuj jaroj dum 6 mi estis estraro de UEA) kaj ĝuis malpli el la kongresaj programoj ol "ĝenerala kongresano", eĉ momenton mi ne bedaŭris la reprezentan laboron por ESPERANTO NEDERLAND.

Ĝi estas interesa, valora kaj fruktodona por la Asocio, por UEA kaj por vi mem, se vi kapablas milde trakti la seriozecon de la funkcio.

Ans Bakker-ten Hagen,
komitatano A por Nederlando.

EKSKURSO AL LA REDAKCIO.

Verkado, vi ĝojigas min,
estiĝas bela tekst'!
Vi legu ĝin, plezur'por vi,
se bonsukcesis mi!

Valeri, valera,
se bonsukcesis mi.
(Laŭ germana popolkanto)

Volonte mi donas kelkajn impresojn pri la laboro de la redakcio, almenaŭ: pri la laboroj kiujn mi faras, helpate de multaj aliuloj.

Kun plezuro mi memoras ke antaŭ kelkdek jaroj esperantisto el Usono vagis tra nia strato, serĉante la Centran Oficejon de Skolta Esperanto-Ligo. Li trovis nur min, en ĉambreto en mia hejmo. Ĉe la redakcio la afero estas simila.

Dum normala redakcio konsistas el aro da homoj, kun sekretarioj, arkivistoj kaj aliaj, nur du personoj faras la laboron por Fen-X: la finan redaktadon en Zaandam faras nur mi, per, kompreneble, komputilo. Gravan laboron por kolekti materialon faras Hans Bakker en Amsterdam. Ĉio laŭ la moderna metodo de "tele-laborado".

Tekstoj.

Feliĉe ofte venas kontribuoj de la legantaro, preskaŭ ĉiam elektronike. Zorge mi klopodas konservi kaj ordigi ilin, sed la lasta estas ne ĉiam facila. El 10 kontribuoj ja 6 havas la temon aŭ titolon "Por FenX", 3 portas la nomon "Artikolo" kaj nur hazarde unu el ili klare prezentas sin.

La lingvo ne malofte donas problemojn. Kiam en la komencaj jaro de Esperanto al la presistoj mankis literoj kun supersignoj, Zamenhof konsilis uzi aldonan h. Tiel la homoj tamen povis presi esperantajn tekstojn.

Sed komputiloj ne estas homoj, por ili oni poste pro praktikaj kialoj elektis la literon X. . . kaj tio tre bone funkcias. Klare: NE por uzo de homoj, sed por helpo al komputiloj, kiuj ja ne kapablas memstare uzi sian cerbon.

Tamen: Esperantistoj estas lertaj, kelkfoje tre obstinaj. Tiuj daŭre uzas la h. Kaj multaj el ili mem trovis manierojn por skribi literojn kun supersignoj. Bonege, sed...

Komputiloj nur sklave laboras. Kiam oni sendas komunikon, ili tuj elektas liberan vojon, ĝis fine la komuniko alvenas ĉe la ĝusta adreso. Tiel povas okazi ke komuniko de Wormerveer al Zaandam serĉas sian vojon tra Ameriko kaj Aŭstralio. Vi povas legi tion en la detaloj, kiuj antaŭiras ĉiun komunikon.

Ne ĉiu servilo dumvoje estas same bonkvalita, tial la specialoj kodoj de iu lerta esperantisto povas malaperi, kaj mi ricevas komunikojn kiel "Estimata, mi tre ĝatas vian revuon, kiu ĉiam ĝojigas kaj feliĝigas min. Tial ĉi tie vi ricevas kontribuon de mi". Problemoj nur ekzistas kiam la sendinto subskribas per J○○○ar○○ Koro○○onko.

Alia specialaĵo estas kiam oni ĉe komuniko el eksterlando dek-tri-foje ricevas la inviton instali la programon por la portugala aŭ ĉina lingvo.

Bildoj.

Jules Verne verkis plurajn librojn pri teknikaj ebloj kiuj tiutempe tute ne ekzistis. Sed pri la eblo sendi bildojn per drato tra la tuta mondo li neniam pensis.

Bildoj sur papero konsistas el malgrandaj koloraj punktoj. Iom simile al bildoj en la gazetoj, kiujn la maljunuloj inter

ni certe memoras el la pra-historio.

Nuntempe tiuj punktoj estas tiel malgrandaj, ke oni ne povas vidi ilin aparte. La mezuro por tio estas DPI, tio estas DOTS PER INCH, la nombro de punktoj en unu angla colo.



Presisto por luksaj presaĵoj postulas ke la nombro de la denseco estu 400 DPI. La Grafika Centro kiu presadas Fen-X bezonas minimume 200 DPI.

Tio, ĝis antaŭ ne-longe, ne donis problemojn, sed la teknikaj ebloj progresas, kaj ilin akompanas specialaj problemoj. Se oni sendas foton de 200 DPI aŭ pli, ĝi senprobleme povas aperi en la revuo. Sed

nuntempe oni ofte kolektas la bildojn en "albumoj", metas ilin en ret-paĝojn, aŭ sendas ilin rekte el sia telefono.

Tiam ekz. geavoj tutmonde povas vidi siajn genepojn sur la ekrano de la komputilo. Sed... la bildoj estas bonegaj por la ekrano de komputilo, por papero ili tute ne taŭgas. Ili havas nur 72 DPI, kaj la mezuro estas nur kelkaj centimetroj.

Aldona ĝeno: facile la memorkarto de fotilo enhavas centojn da bildoj. Do kelkfoje sendanto de artikolo afable aldonas albumon kun centoj da bildoj. Multaj horoj perdiĝas en la serĉado de nur unu uzebla bildo. Tial mi petas: vi mem elektu du, tri bildojn, kaj sendu ilin aparte kiel "aldonon" ĉe via komuniko.

Plezuro.

Neniam mi bedaŭras la tempon kiun mi uzas por la redaktado. Dum aliuloj uzas sian cerbon por solvi enigmojn, ŝakludi aŭ kartludi, mi uzas ĝin por prizorgi Fen-X, kaj kiam tio sukcesas, mi estas feliĉa. Multaj homoj ĝojas pro nia laboro, ili ne malofte esprimas siajn laŭdon kaj dankon, eĉ kiam mi mem ne estas tre kontenta. Mi kalkulis ke ili nombras precize 99,75% de la membraro.

Plendoj.

La redakcio estas sendependa de la estraro, sed la jarkunveno povas decidi, ĉu la redakcio daŭrigu sian laboron. Kaj vere, 0,25% de la membraro estas malkontentaj.... Eĉ ili acide konsilis ke mi komprenu kiel fuŝe mi funkcias, kaj ke mi fine, post multaj jaroj, ripozu de miaj taskoj. Nu, mi havas ankoraŭ multajn aliajn plezurigajn taskojn por fari, kaj mi do ne malakceptas tiun konsilon. Kandidatoj sin anoncu tuj!

Fine.

Laste: mi ĉi tie ĉefe rakontis pri miaj propraj laboroj. Sed mi nepre dankas mian kunredaktoron Hans, kies tre valora helpo ne povas manki. Cetere mi dankas la teknikan redaktoron en Antverpeno, kiu ĉiam zorgas ke nia revuo mirige bele aspektas. Kaj certe mia danko iras al ĉiuj legantoj, kiuj regule provizas min per kontribuoj kaj ideoj. En la supra artikolo vi eble trovis kelkajn ideojn por perfektigi vian kunlaboron...

JKH

PROF. D-RO IVO LAPENNA

Prof. d-ro Ivo Lapenna (1909-1987), kies centjariĝon ni festis la 5-an de nov. 2009, estis sendube la plej elstara inter la gvidantoj en la organizita Esperanto-movado. Oni ofte ligas lian esperantistan karieron specife kun Universala Esperanto-Asocio, kiun li gvidis en ties modernan institucion formon. Sed lia kontribuo al la Movado superverŝas la limojn de tiu institucia identeco. Lapenna estis la plej elstara oratoro en la historio de la lingvo. Lia verko "Retoriko", kiu instruas la arton de parola persvadado, vicas inter la klasikaĵoj pri tiu temo en iu ajn lingvo. Liaj paroladoj restas modeloj ofte aŭskultataj de sinsekvaj generacioj. La sukceso de lia retoriko en Montevideo en 1954 estis venko ne nur por UEA, kiun li tie reprezentis, sed ankaŭ por la parola persvadado, la sola akceptebla batalilo en serioza batalado por la paco. Li multe laboris ne nur por akceptigi kaj fortikigi la demokratian metodaron, sed ankaŭ specife por pliakrigi la retorikon kaj plivastigi la kapablon de publikaj agantoj uzi ĝin efike. Multaj el ni ne memoras, ke li ankaŭ fake okupiĝis pri la evoluigo de nia lingvo: en la Simpozio pri ata/ita, libroforme organizita de la eldonejo Stafeto, gramatikistis kun aliaj gramatikistoj ankaŭ Ivo Lapenna, tute kapable kaj senlute. Tamen kompreneble li specife apartenis al tute alia fako: li estis grava fakulo pri la internacia juro, kaj ĝuste surbaze de tiu sia faka kono li muldis la postmilitan laborlinion de UEA. Lia sinengaĝo sur la tereno de la homaj rajtoj kreis apartan profilon ne nur por UEA, sed ĝenerale por la movado de post la dua mondmilito. Pro liaj klopodoj UEA jam ekde 1947 – unu jaron antaŭ la formala adoptiĝo de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj en Unuiĝintaj Nacioj – enstatutigis la principon, ke la respektado al homaj rajtoj UEA rigardas kiel nepran antaŭkondiĉon por siaj laboroj. Al la hodiaŭa generacio devus esti grave, ke li estis inter la unuaj, kiuj en la batalo por konservi la malfortajn lingvojn kaj kulturojn emfazis la koncepton de lingva genocido kiel juran batalilon.

El la perspektivo de la juro li prezentis analizon de la lingva geopolitiko kaj bazis sur tio la pledadon por Esperanto kiel justa solvo. La principoj de tiu analizo akiras pli ĝenerale agnoskatan gravecon hodiaŭ, kiam multaj komentantoj iom post iom agnoskas la valoron de moralaj (anstataŭ nur de pragmatikaj) konsideroj en la agado sur la monda scenejo, kaj kiam la voĉoj de la neregistraj organizaĵoj kiel portantoj de tiuj moralaj valoroj – foje opozicie al la foje senmoralaj ŝtataj sistemoj – plifortiĝas en la internaciaj institucioj. Mi ne volas en tiel grava jubilea momento paroli ĉefe pri la UEA-kariero de figuro, kiu tiel elstare skulptis tutan ĉielpejzaĝon por la lingvano kiel tuto: tro mallarĝe limigi lin al nia asocio donus la impreson, ke ni volus iel ŝteli lian vizaĝon por ni! De LPLP (kiu en lia tempo havis la pranomon "La Monda Lingvo-Problemo") ĝis la serio Oriento-Okcidento, de la dumkongresa oratora konkurso ĝis la roterdama oficejo de UEA, tiom da institucioj de nia asocio atestas lian ĉarpentistan lerton, ke ni prefere ne eku pri tiu temo, sed lasu al la tuta esperantista publiko, sendiskriminacie pri asocia aparteno, aplaŭdi la memoron de tiu homo, kiu donis al ni plej da kialoj por aplaŭdi!

Probal Dasgupta.

Gaz. Komunikoj de UEA N-ro 346 // 2009-11-04.

10-A DE OKTOBRO 2009: FAULHABER-KONFERENCO EN AMSTERDAMO



Je bela sabatmateno kolektiĝis ĉirkaŭ 30 esperantistoj por partopreni la Faulhaber-konferencon. Per ĝi la asocio ESPERANTO NEDERLAND markis la specialan jaron 2009, kaj la 150-an naskiĝdatrevenon de d-ro Zamenhof. Kun kafo kaj frandaĵoj ni estis bonvenigitaj en la gastejo Zeeburg en Amsterdamo, sed ni ne havis multe da tempo por babilo. Nepris atenti la horloĝon, ĉar la organiza teamo sukcesis kunmeti vere abundan programon!

El ĉiaj vidpunktoj ni pritraktis Zamenhof, samkiel lian heredaĵon. Post enkonduko de Ans Bakker-ten Hagen, Hans Bakker legis al ni la kortuŝajn priskribojn pri la juna Zamenhof el la fama verko de lia amiko Edmond Privat. Poste Bert de Wit testis niajn sciojn per Zamenhof-kvizo. Por nia lingvo ja plej gravas instruado, kaj tiu temo do ricevis vastan atenton en superrigardo pri multaj instrumetodoj, kiujn ni pristudis teorie sed ankaŭ elprovis praktike. Kondukis nin tra la temo la sperta E-instruisto Sylvain Lelarge.

Post tiom da streĉa atentado ni rapidis al la manĝejo, kie ni ĝuis luksan lunĉon. Refortigitaj ni daŭrigis la programon. Sinsekve prezentiĝis: la riĉaĵoj de la Esperanta literaturo en prelego de Gerrit Berveling; sciencaj esploroj pri la lingvo fare de Wim Jansen; vojaĝo al Afriko, kie Svetlana Milanovich kaj Johan Derks instruis al grandaj grupoj da junuloj. Fine, post vespermanĝo, Douwe Beerda montris kiel la nova retejo de NEJ bonege informas en nunstila maniero.

Tiel ni atingis la finon de la programo eĉ iom frue, sed tio nur estis konvena por pluraj partoprenantoj kiuj venis de fore. La ceteraj decidis kompletigi la tagon en apuda trinkejo.

Tio finis la konferencon, sed tamen ne la kunestadon. Dimanĉe gesinjoroj Bakker aranĝis turisman ekskurson tra Amsterdam. Sub ilia sperta gvidado ni promenis tra la malnova urbocentro, admiris la restaŭritajn atendejojn de la stacidomo kaj esploris la malmulte konatan nordan zonon de la urbo. Ankaŭ mi, amsterdamano de 20 jaroj, lernis multe dum ĉi tiu tago! Bela surprizo je la fino estis la bongustega vespermanĝo kiu atendis nin en la hejmo de Ina van der Kamp.

Multaj homoj kontribuis al ĉi tiu bela semajnfino. Mi volas kore danki al ili ĉiuj, sed precipe al la Faulhaber-komisiono: Ans Bakker-ten Hagen, Els ten Hagen kaj Ineke Emmelkamp. Kaj fine mi esprimas la esperon ke ĉi tiu aranĝo estos la komenco de nova tradicio!

Arjen-Sjoerd de Vries.

VORTORDO LIBERA... ĈU VERE?

W. Jansen dum la Faulhaber-konferenco.

Okaze de mia esplorado pri la vortordoj uzataj de nuntempaj esperantistoj mi en pasintaj jaroj submetis 40 personojn de diversaj gepatraj lingvoj al enketo konsistanta el pli ol cent demandoj. Ĉi-sube mi nomos tion mia internacia referenco. Dum la Faulhaber-Konferenco mi laborigis la partoprenantojn super kvin el tiuj demandoj por iom esplori ilian 'lingvan konduton'. Mankis la tempo por doni detalajn instrukciojn, pro kio kelkaj respondoj montriĝis neuzeblaj, ne pro kulpo de la enketitoj. Malgraŭ tio, la finaj rezultoj de la 21 enketitoj estas tre interesaj kaj sendube reprezentaj kaj komparindaj kun tiuj de la internacia referenco. Jen sekvas resumo, ne nur por ĉiu partopreninto, sed por ĉiu interesito pri la lingvo ĝenerale.

Kiam oni konfrontiĝis kun la peto, konstrui naturan frazon el jenaj tri elementoj, prezentitaj en alfabeto vicordo: la filon, la patro kaj renkontas, 18 el 18 partoprenantoj proponis la frazon La patro renkontas la filon (tri respondoj estis neuzeblaj). Tiun elekton ne influis iu 'direkto' en la signifo de la verbo, kiel ekz. en La patro alparolas la filon, en kiu oni povus lingve reprezenti la direkton de la ago de maldekstre dekstren. La elekton ankaŭ ne influis iu 'direkto' de la aganto al la suferanto, kiel ekz. en La patro punas la filon. En nia kazo la patro kaj la filo estas komplete interŝanĝeblaj kaj ankaŭ la verbo renkonti estas tute neŭtrala. Same kiel la referenca grupo, la konferencanoj senescepte elektis la vicordon subjekto-verbo-objekto (SVO). Ĉu hazarde? Ne: SVO estas la baza vortordo en la nederlanda kaj ankaŭ en ĉiuj modernaj fontlingvoj de Esperanto. Se ni rigardas nur la paron SO en tiu ĉi sinsekvo, sendepende de la loko de la verbo, ni povas konstati, ke pli ol 80% de la lingvoj tutmonde respondas al tiu ĉi modelo. Ni diru, ke la elekto de la konferencanoj estis komprenebla, sed ankaŭ tute natura laŭ la kriterio de la universaleco de Esperanto.

Se en iu situacio la baza ordo do estas Mi volas tiun pomon (SVO), 80% de la enketitoj, emfazante, ke ĝuste tiun pomon oni volas, preferis la inversigon al Tiun pomon mi volas (OSV) anstataŭ uzi la malpli klaran Estas tiu pomo, kiun mi volas (la referenca grupo montris tre similan ciferon de 72%). Ĉu ni dankas tiun inversigon nur al la akuzativo? Ne, certe ne, ĉar ankaŭ en lingvoj sen markita akuzativo oni volonte inversigas, sed la akuzativo sendube helpas rekoni la intencon de la parolanto. Movi frazelementon el ties hejma pozicio por ĝin emfazi estas universale rekonebla metodo.

Ni ĉiuj scias kaj nun komprenas, ke La studento legas libron estas la plej natura simpla komunikado por priskribi la koncernan scenon antaŭ niaj okuloj. Sed en la kazo de libro jam konata kaj referencita per ĝin, 15% de la enketitoj forlasis la bazan ordon kaj preferis La studento ĝin legas. Tiu forlaso bele koincidas kun 13% en la internacia referenco. Estas konate, ke malpli pezaj frazpartoj pli facile inklinas al libera moviĝo tra la frazo, ol pezaj. Precipe pronomoj kiel ĝin montras tiun universalan tendencan, kiu do estas retrovebla en Esperanto.

Kombinante la kvar elementojn li, ne, per kredo kaj skribas (el tiu alfabeto vicordo) en simplan komunikadon frazon, la plimulto de la enketitoj (13 el 21, t.e. 62%) preferis Li ne skribas per kredo kontraŭ 6 el 21 Li skribas ne per kredo (du enketitoj proponis alian solvon). En la referenca grupo la plimulto estis pli impona: 95%. El kompletaj testoj (ne faritaj en Amsterdamo) montriĝis, ke la vorteto ne firme gluiĝas al fiksa pozicio antaŭ la verbo kaj moviĝas for de ĝi prefere nur en kazoj de eksplicita kontrasto, ekz. Li skribas ne per kredo, sed per plumo. En la internacia referencgrupo tiu tendenco estis klare trovebla, sed en la 'amsterdama' kazo multe malpli. Eble kulpas ĉi tie la influo de certaj lernolibroj por nederlandlingvuloj, kiuj donas iom simpligan regulon pri la neado kaj ilustras ĝin nur per ekzemploj kun kontrasto (vidu ekz. La komencanto, 1965, p. 20). Se ni volas bazi nin sur universalaj propraĵoj de la homa lingvo, la senkontrasta Li skribas ne per kredo estas interpretebla kiel nekompleta frazo kaj tial ne tre aprobinda, kiel jam indikis la pli internacia referencgrupo.

En konversacia kunteksto, kiu konsistas el Multaj membroj ofte vizitas la klubkunvenojn. Ĉu ankaŭ Maria regule venas? oni povus daŭrigi en la nederlanda per Haar ouders, die moeten we eens vragen. Tiu ĉi konstruo, kiu estas uzata por enkonduki novan temon en la konversacion, estas tipa por la parolata lingvaĵo. Kaj en Esperanto? Montriĝis, ke la enketitoj juĝis la frazon Ŝiajn gepatrojn, ni devus demandi ilin inter 'neakceptebla' kaj 'dubkvalita', tre simile al la referencgrupo. El kompletaj testoj (ne farita dum la Faulhaber-Konferencotago) montriĝis, ke la frazo Ŝiaj gepatroj, ni devus demandi ilin estis eĉ malpli akceptebla. Inter kazohavaj lingvoj, tamen, la frazo Ŝiaj gepatroj, ni devus demandi ilin kun la senkaza tem-enkonduko estas universale preferinda, sed la internacia referenco kondamnis ĝin eĉ pli forte ol la kazohavan. Mi imagas, ke rolis en tio la neakordo inter la nominativa Ŝiaj gepatroj kaj la akuzativa ilin. La esperantistoj, fidelaj je sia gramatiko, ja volas antaŭ ĉio, ke ilia lingvaĵo estu 'korekta', eĉ en la kazo de suspektinda frazkonstruo. Supozeble, pro tio ke la parolata lingvaĵo estas malpli evoluinta en Esperanto ol ekz. en la nederlanda, kaj malpli respeguliĝas en la skriba lingvaĵo, nek la akuzativa nek la nominativa frazkomenco renkontis aprobon inter la enketitoj. Ni devus atendi la pluevoluadon de Esperanto kiel parolata lingvo por eltrovi, ĉu ankaŭ ĉi tie la lingvo universaliĝos.

Konklude: la amsterdama grupo de enketitoj pruvis la naturecon de sia lingva konduto laŭ diversaj universalaj kriterioj. Unu fojon oni hezitis, eble pro neforgesita lernolibra regulo, kiu iom kontraŭdiras la naturan fluon de la lingvaĵo, sed nur hezitis: plimulte, kvankam ne tre konvinke, oni sekvis la korektan intuicion. Pri la parolata lingvaĵo restas multo esplorinda, kaj por tio necesas pli intense kaj pli kuraĝe uzi la lingvon parole.


Al la enketitoj dankon por la afabla partopreno. Kaj ĉiuj konsciu: neniu eraris, ĉar erari ne eblis!

POŝTMARKO PRI IVO LAPENNA



Por omaĝi la 100-an datrevenon de la naskiĝo de Ivo Lapenna UEA mendis ĉe la poŝta kompanio TNT poŝtmarkon kun lia portreto. La nova marko estis lanĉita en la naskiĝtago de Lapenna, la 5-an de novembro, kaj ĝia nominala valoro egalas al tiu de la enlanda afranko por letero ĝis-20-grama en Nederlando. La poŝtmarko estas

vendata en folioj kun 10 markoj, mendeblaj ĉe la Libroservo de UEA. Unu folio kostas EUR 5,50 (plus afranko; kvanta rabato ne estas aplikebla). La eldonkvanto de



la marko estas limigita kaj post la elĉerpiĝo ĝi ne estos represata. Sekve ĝi rapide fariĝos dezirata objekto ĉe kolektantoj, same kiel la poŝtmarkoj lanĉitaj en 2008 okaze de la 93-a UK kaj la 100-jariĝo de UEA. Ĉi-jare aperis ankoraŭ dua poŝtmarko, kiu omaĝas la 150-an naskiĝdatrevenon de L. L. Zamenhof. Ĝi estis lanĉita en la Malferma

Tago de la Centra Oficejo de UEA, la 28-a de novembro. Ankaŭ la Zamenhof-marko aperas en 10-markaj folioj kaj ĝiaj vendokondiĉoj estas samaj kiel tiuj de la Lapenna-poŝtmarko.

FILATELO

Kolektado de poŝtmarkoj jam ekzistas ekde la momento kiam ili ekestis. Unue la kolektantoj ankoraŭ povis esperi ke iam ilia kolektaĵo estos kompleta, sed jam baldaŭ oni komprenis ke tio ne plu eblos. Tiom da landoj eldonas tiom da poŝtmarkoj...

Kaj alia problemo estas ke kelkaj landoj ne nur eldonas poŝtmarkojn por pagi poŝtajn servojn, sed per vere abunda eldonado klopodas kolekti monon... per la kolektantoj kiuj tiel arde deziras kompletigi sian kolektaĵon.

Rimedo kontraŭ tio estas limigi la kolektadon al speciala temo: ekz. nur markoj pri Skoltado, pri Spacveturado, aŭ, inter ni, pri Esperanto.

Nun tamen aperis nova minaco: ĉe multaj poŝtservoj ĉiu per ioma krompago povas mendi propran poŝtmarkon. Ĉu ankoraŭ nun eblas kompletigi sian kolektaĵon...? Mi dubas. Ĉi-jare tiel aperis ĉe UEA poŝtmarko por memori Ivo Lapenna, kaj dua por memori la 150-jaran jubileon de Zamenhof. (formato 3 x 4 cm, violkolora, nigra teksto) Mi opinias ke ili aspektas eble iom tradiciaj, sed tamen pli belaj ol la poŝtmarkoj, kiujn poŝtservo TNT nuntempe eldonas. Tiuj lasttempe ja estas mirige malbelaj...



Ankaŭ la Esperanto-asocio HIRUNDO en TIENEN, Belgio en aprilo 2009 eldonis sian propran poŝtmarkon, laŭ ideo de Pieter Dewever kun portreto kiun desegnis Georges Bollens. Mirige estas ke mankas la valor-indiko...? (formato (48+24) x 27 mm. Verda kaj ruĝa).

SKOLTA ESPERANTO-LIGO:



Nova retpaĝaro.

Dum la semanjfino de la 30-a oktobro ĝis la 1-a de novembro kelkaj membroj de SEL kunvenis en Bruselo, por prepari novan kaj modernan ret-paĝaro pri la Ligo.

Kunvenis por tio Fabien Tschudi el Francio, Volker Schlüter el Germanio, en la hejmo de la Gen. Sekretario Guido Ricci, italo, kiu laboras ĉe la Eŭropa Parlamento. Pro speciala invito ankaŭ ĉeestis la iama ĝen. sekretario kaj honora membro de SEL Ko Hammer kun sia edzino.

Dum kelka tempo telefone partoprenis ankaŭ Jaroslav Fotyga el Pollando.



Estis klare ke SEL disponas pri kelkaj lertaj kaj spertaj retistoj, kaj baldaŭ ekhavos bonegan ret-paĝaron. La Ligo vere bonfartas, ĉefe aktivatas per interreto, kie ankaŭ regule eldoniĝas la Liga revuo "La Skolta Mondo".

Vidu: <www.esperanto.org/skolta/>.

HERZBERG: ESPERANTO-URBO.

Ne ekzistas kareso sen intereso.
(el: Proverbaro, de Zamenhof)

Ĉagrene oni en Herzberg vidis, ke turistoj ofte iras al apudaj urboj anstataŭ al Herzberg. Bedaŭrinde, ĉar ili loĝas en hoteloj, vizitas restoraciojn kaj volonte butikumas. Ili donas laboron kaj do enspezojn.

Por plibonigi la situacion oni elektis rimedon, kiu vere povas feliĉigi nin: ili adoptis Esperanton kiel lingvon de la urbo.

Antaŭ duona jaro, kiam majo transiris al junio, estis granda festo, al kiu oni invitis esperantistojn el la tuta mondo. Kiom da ili partoprenis?

Malfacila estas la respondo. Komence ĉeestis ĉ. 100, kaj tio kreskis al 400, sed jam tuj poste la nombro malkreskis kaj fine restis nur 30, 40 da ili.

La etoso estis bona, la urbestro eĉ iom lernis nian lingvon kaj povis saluti Esperantlingve. Poste li eĉ vizitis la Universalan Kongreson en Rotterdam.

Kees Ruig tiel entuziasmiĝis ke li verkis kaj komponis himnon por la urbo, kun la espero ke okaze de ĉiu posta evento oni aldonu strofon. Komprenobe li prezentis ĝin kun akordiona muziko.

La sekretariino de la urbestro poste sendis al li dankleteron, ornamitan per fiera rubando: "... die Esperanto-Stadt, / la Esperanto-urbo". Sed strange: ĉi tiu internacia kelkfraza letero estas.... en la germana lingvo.

JKH.

LA NEDERLANDAJ INSTRUISTOJ KUNVENIS

La Nederlanda ILEI-Sekcio, NGGE, okazigis la 17-an de oktobro 2009 sian tradician Studotagon.

Ĉi-jare la temo estis 'Ludoj por instrui E-kulturon'. La ĉefpreleganto estis S-ino Ana Montesinos de Gomis, hispandevena esperantisto el Britio. Ŝi vigle prezentis diversajn ludojn kaj lasis al la partoprenantoj la eblon mem ludi por testi la materialon.

En la posttagmezo okazis telekonferenco kun la ĝemela ILEI-Sekcio en Kubo. Tiam la prezidanto de Kuba E-Asocio kaj estrarano de ILEI S-ro Julián Hernández Angulo prezentis la situacion pri instruado de Esperanto en Kubo kaj varbis por la diversaj eventoj okazontaj en la venonta jaro en Kubo (ILEI-Konferenco, UK kaj IJK).

Plie, la NGGE-prezidanto, S-ro Rob Moerbeek, prezentis novajn eldonaĵojn speciale emfazante tiujn, kiuj iel pri-traktas Kubon aŭ estas eldonitaj tie.

La Studotago okazis en la sidejo de la Centra Oficejo de UEA.

Atilio ORELLANA ROJAS, NGGE-sekretario

KOMUNIKO DE INTERNACIA ESPERANTO-INSTITUTO: GRAVAJ ŜANĜOJ ĈE IEI.

La 1-an de junio 2009 Edwin Burg demisiis kiel IEI-estrarano. Dum 1978-1988 li volontule kaj plentempe laboris kiel oficejestro en la Andreo-Cseh-Domo en Hago. En 1995 li eniris en la estraron de IEI kaj eminente okupis sin pri la branĉo 'publikaj rilatoj'. Post sia 84-jariĝo en marto li decidis demisii el tiu funkcio.

La nuna estraro konsistas el Ed Borsboom (prezidanto), Kees Bos (sekretario), Piet Buijsters (kasisto) kaj Toon Witkam (teĥnologio).

Ekde la 6-a de okt. 2009 Atilio Orellana Rojas ne plu laboras por IEI kaj li estas forlasinta la Andreo-Cseh-Domon. Neniun taskon kiel i.a. kursoj, seminarioj kaj ekzamenado rilate al IEI ekde tiu dato li rajtas plenumi en la nomo de aŭ sub aŭspicio de Internacia Esperanto-Instituto. Aliaj transprenos tiujn taskojn.

Pluaj informoj kaj kontakto: <www.iei.nl> aŭ <iesperanto@versatel.nl> aŭ 070-3556677.

Paperaj poŝtaĵoj nur (ĉar IEI-poŝtkesto ne ekzistas) al Riouwstraat 172, 2585 HW Den Haag.

Kees Bos, Estraro IEI.

"E-VID-E-NT-E"

JAM KVARFOJE MISIIS EN 2009!

Kia mi epitetu la kvaran mision, kiun Fondaĵo Evidente, jam 43 jarojn senlace batalanta kontraŭ nenecesa vidhandikapeco, ĉi-jare iniciatis? Ĉu benita, sukcesa, kontentiga, esperiga? Sendube mi unualoke menciu, ke nia bona lingvo ludis en ĝi ŝlosilan rolon. Kial? Ĉar du aktivaj esperantistoj, Anatolij Masenko kaj Viktor Podoljan, rolis kiel perfektaj kontaktpersonoj. Ili aranĝis efikan agadprogramon, kiu malblinde gvidis nin al diversaj lokoj kaj celgrupoj. Kompreneble ni havis agrablan renkontiĝon kun gesamideanoj.

Responde al oficiala invito de la Tutrusia Socia Unuiĝo de Handikapitoj (TSUH) kaj la Rusia Esperanta Asocio de Nevidantoj (REAN) en Kislovodsk, la 5-an de oktobro flugis al Norda Kaŭkazio Jacques Tuinder, kiun

akompanis la belga kaj nederlanda optometroj Johan Hoet kaj Jeroen Mulder. Ili ĝuis neimiteblan gastamon (manon, panon, banon, bonvenon kombine kun lito) en la Kislovodska kaj Georgievsk blindulejoj, kie ili servis al multegaj lernantoj kaj instruistoj. Mi emfazis ke Anatolij Masenko, estrarano de Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj (LIBE), dum 43 jaroj docentis pri matematiko kaj instruis Esperanton.

La teamo laboris en la Centro de la Asocio de Vidhandikapitoj en Pjatigorsk, en la institutoj por vidhandikapitaj infanoj en Kislovodsk kaj Georgievsk, en la fama Kislovodska Medicina Centro por viddifektitoj, kiuj preparas sin por profesioj kiel masaĝisto, fizioterapiisto, k.s., en Rekapabligejo por divershandikapitoj en Essentuki, en maljunulejoj ktp. Same kiel en Kaliningrad (novembro 2008), ni ne sukcesis mezuri okulojn de malliberuloj en prizono, ĉar la justicministro tion ne aprobis, juĝante, ke al eksterlandanoj oni donu enirpermeson nur kondiĉe, t.e. ke ili antaŭe faru krimon. . . Entute ni vidis pli ol 1700 okulojn. Al multaj ni povis servi per novaj aŭ pli bonaj okulvitroj. Kiel ĉiam ni konstatis ke abundas katarakto kaj glaŭkomo. Ni vidis dekojn da operacieblaj pacientoj, sed laŭdire pasivas okulistoj.

De la rusaj ambasadejoj en Antverpeno kaj Hago ni ricevis senpagajn vizojn. Kvankam la nederlanda Ministro por Eksterlandaj Aferoj ankoraŭ ĉiam donas negativan vojaĝkonsilon ke oni prefere ne vizitu Kaŭkazion, ni nenie spertis signojn de perforto, konfliktoj, ebrieco, neregulaĵoj. Ni sentis nin en bonaj manoj de varmaj geamikoj, kiuj fidele kaj modele asistis, konsilis kaj zorgis. Ni tute ne komprenis, ke nia registaro en la tagoj de la (danke al la ĉielo finiĝinta) Malvarma Milito devigis nin 'timi la rusojn'! Tiajn rusojn ni tute ne renkontis. . .

Danke al la fakto, ke Fondaĵo Evidente havas elstaran ambasadoron en la persono de Bram Bol, pliamplekiĝas ade kaj ade niaj aktivaĵoj. Atendatas aŭ survojas invitoj el jenaj landoj: Eritreo, Kongo, Latvio, Maŭritanio, Rumanio, Rusio kaj Togolando. Tio estu signalo al 'nia diligenta kolegaro' iom kontribui al la batalo kontraŭ daŭre kreskanta vidhandikapeco en grandaj partoj de nia mondo.



Koran dankon al Jeroen kaj Johan, Anatolij kaj Viktor, al afablaj sponsoroj kaj ĉiuj, kiuj faris nian mision neforgesbla evento!

Jacques Tuinder, prezidanto de E-vid-E-nt-E.

< www.stichtingzienderogen.nl >

Fondaĵo Evidente, Henegouwenlaan 35, 1966 RH
Heemskerk // Bankkonto 10 20 100,
Stichting Zienderogen, Heemskerk.

FEN-X

15a jarkolekto, n-ro 1
januaro - februaro 2010
Esperanto Nederland
H. Bakker
Kastelenstraat 231
1082 EG Amsterdam

TNT Post

Port betaald

Port payé

Pays-Bas